

EX.A - 17177



KURESSAARE

sanigŝlima kaj mava kuvacloko en Estonio

Plej bonan kuraceblon, plej interesan pasigon de libertempo kaj plej siaspecajn oportunaĵojn prezentas somerumurbo,

ŝlim- kaj markuracloko Kuressaare en Saaremaa. (Osel. Estonio)


La somerumurboj de nia kontinento estas al la plimulto de vizitantoj jam tro konataj, tro ofte viditaj, travivitaj kaj tial fariĝintaj tro hejmecaj. Sed, libertemponte, oni deziras ŝanĝon, oni deziras vidi ion novan, originalan, fremdan kaj malpli konatan.

Tiajn somerumdezirojn kaj -revaĵojn povas plej plaĉe kontentigi la somerumloko Kuressaare en Estonio kaj ĝia siaspeca ĉirkaŭaĵo Saaremaa.

Marĉirkaŭata insulo kun siaspecaj vivkutimoj kaj sur la suda bordo de l'insulo la urbo, dronanta en sunbrilo kaj verdaĵo, kun eksterordinare milda klimato kaj altkvalita, saniga kuracŝlimo, — jen la somera paradizo de malsanuloj kaj ripozbezonantoj.

KLIMATO.

Neordinare varma kaj milda marklimato de Kuressaare estas la plej esenca faktoro por kaŭzi plifortiĝon. Minimume ŝanĝiĝema temperaturo, altkvanta ozonenhavo kaj absoluta pureco de l'aero estas la plej valoraj kvalitoj de la marklimato de Kuressaare. Dum jardekoj faritaj klimataj observadoj montras, ke en Kuressaare $\frac{2}{3}$ de somertagoj estas sunbrilaj kaj sekaj, dum en aliaj lokoj de Estonio nur $\frac{1}{2}$ de somertagoj estas senpluvaj. Pro tiuj kaŭzoj somerumado en Kuressaare prezentas la plej favoran okazon por maksimuma profitado de libertempo por marbanoj kaj res-



Kastelo.

tado en libera aero. Konsiderinda estas la forestado de nebulo dum vesperoj. Restado en klimato de Saaremaa vigligas la asimiladon, plifortigas la korpon, plikvantigas la sangon, rebonigas la funkciadojn de la haŭto ktp. Maro, ĉirkaŭanta Saaremaa, prezentas la plej firman kvarantenon kontraŭ diversaj malsanmikroboj.

NATURO.

La mildeco kaj neŝanĝigebleco de la klimato de Saaremaa kaj Kuressaare kaŭzas riĉan kaj diversspecan vegetaĵaron.

Ĉi-tie kreskas pluraj arboj kaj kreskaĵoj, kies hejmloko ordinare estas en sudlandaj arbaroj.


Fruktoriĉaj ĝardenoj prezentas al somerumantoj en abundo bongustajn kaj malmultekostajn fruktojn kaj berojn.

VARMO DE MARAKVO.


La meza temperaturo de marakvo dum somermonatoj estas 18° — 25° C. Observadoj pruvis, ke la varmo de marakvo konstante superas tiun de aero, kiu cirkonstanco prezentas konsiderindan avantaĝon ĉe banado, precipe por nervemaj kaj malfortaj malsanuloj kaj infanoj.

KURESSAARE — LA PLEJ FAMA ŜLIMKURACLOKO.

Saniga kapablo de la kuracŝlimo de Kuressaare, pruvita per pli ol 100-jara kuracsukceso, estas akirinta al Kuressaare merititan famon inter kuraclokoj.



Malnova puto en korto de kastelo.



Unu el la salonoj en kastelo.



Bordaleo.


Pura kaj altvalora kuracŝlimo je proporcia konsisto, varmaj kaj sunabundaj veteroj, ebligantaj marbanadon dum la tuta somero, estas la plej gravaj kondiĉoj por resanigo de diversaj malsanoj, el kiuj ni citas la ĉefajn: reŭmatismo de artikoj, muskoloj kaj nervoj, periferiaj nervdoloroj kaj nervinflamoj, diatezo de urinacido — tavolo de urinacido en histoj, podagro, rigidiĝo kaj paralizo de artikoj kaj membroj, tuberkulozo de artikoj kaj ostoj.

Virinaj malsanoj: kronikaj inflamoj de utero, ovkondukiloj kaj ovarioj.


Malsanoj de stomako kaj organoj de ventriklo: kronikaj inflamoj de galveziko, galvojoj kaj aliaj organoj de ventriklo.

Malsanoj de angioj: vejnitoj kaj vejnobstrukcoj (trombozoj kaj tromboflebidoj).

El infanaj malsanoj estas bonsukcese kuraceblaj: skrofulozo, kaj aperoj de eksudativa diatezo: ŝvelaĵoj de glandoj, sekaj ekzemoj, urtikfebro, ktp.



Strato en urbcentro.



Orkestra pavilono en urba parko.

Ankaŭ la kuracado de diversaj haŭtmalsanoj estas doninta tre bonajn rezultojn.


Milda marklimato, sunabundo, pura aero, egalgrade varma marakvo kaj la ĉi-tie reganta kvieto faras Kuressaare vera liberaera sanatorio por suferantoj pro trolaciĝo de nervoj, trosentemo, ĝenerala malforteco, malbona nutrado kaj anemio.

ŜLIMKURACEJOJ.


La saniga efiko de ŝlimbanoj estas certe pruvita dum multjaraj spertoj.

Kuressaare okupas la unuan lokon en Estonio pro la nombro de siaj ŝlimkuracejoj kaj la banĉambroj en ili. Por akceptado de malsanuloj estas instalitaj tri ejoj: la unua, konstruita en 1840 kaj apartenanta al la urbo, entenas 32 banĉambrojn kun 64 banuoj; la dua — Nova ŝlimkuracejo entenas 36 banĉambrojn kaj la tria — ŝlimkuracejo „Roomassaare“ — 30 banĉambrojn. Ĉiu kuracejo povas liveri 800 banojn dum tago.

En la ŝlimkuracejoj estas preperataj ankaŭ elektrobanoj kaj -masaĝo, karbonacidaj, oksigenaj, pinekstraktaj k. a. banoj.



„Kvieto anguleto“ dum antaŭtagmeza muziko.



Nova bordkazinio.

MARBANOJ.

Precipe grandan gravecon havas en Kuressaare la refreŝigaj marbanoj, havantaj tiun nediskuteblan avantaĝon, ke dank' al la neŝanĝigebla varma akvo (20° — 25° C), oni povas profiti ilin seninterrompe dum la tuta sezono.

KURACADO.


Kuracado de malsanuloj estas en la manoj de multspertaj kaj famaj Estoniaj kuracistoj kaj profesoroj de Tartua universitato. Ĉe mezaj malsanaperoj sufiĉas kuracado dum 4—6 semajnoj; pli seriozaj malsanoj postulas pli longan kuracdaŭron.

SEZONO.

La sezono de marbanoj komenciĝas la 1. de junio kaj daŭras ĝis la 10. de septembro; dank' al la neordinare varma aŭtuno, oni povas daŭrigi la ripoztempon en Kuressaare ankaŭ pli longe.

LOĜEJOJ.

Somere en Kuressaare estas ludoneblaj al somergastoj ĉirkaŭ 400 loĝejoj kun 1200 ĉambroj. Aldone al ili — aro da hoteloj kaj pensionoj; tial zorgo pro manko de loĝejoj en Kuressaare estas superflua. Ĝenerale la luprezoj de somerloĝejoj en Kuressaare estas mirinde malaltaj, kompare kun tiuj de aliaj Estoniaj urboj.



Vespera koncerto antaŭ parksalono.




Urba ŝlimkuracejo.

MANGOPRODUKTOJ.


La bazaro funkcias ĉiun labortagon. Freŝa kaj pura lakto estas ricevebla en abundo. Greno, pano, terpomoj, viando, butero, ovoj, legomoj, fiŝoj kaj aŭtune fruktoj kaj beroj estas konsiderinde pli malmultekostaj ol ie ajn en Estonio.

SPORTO.

En la urbo kaj parko troviĝas laŭtenisplacoj, ĉe la marbordo — diversaj sport- kaj ludiloj, surmare — tol-, rem-, vel- kaj motorboatoj, fiŝriĉaj riveretoj, golfetoj kaj lagetoj por fiŝhokado. Bonaj ŝoseoj por aŭtomobil-, biciklo- kaj motorcikloveturado.



Ŝlimkuracejo „Roomassaare“.



Angulo en vestiblo de ŝlimkuracejo.

MUZIKO, AMUZAĴOJ.


En la belega malnova urba parko kaj marborda pavilono ludas bona orkestro dufoje tage. En la parksalono — vesperaj teatraj kaj kabaredaj prezentadoj, koncertoj, dancoj kaj aliaj amuzaĵoj. En la parko ofte ravaj fajraĵoj kaj iluminado. En la bordkafejo — ĉiutage de la 21—23-a malfruvesperaj koncertoj.

LEGEJO.

En la parka legpavilono, krom senpaga uzado de diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj, ja la dispono de la publiko por tre malalta pago estas la urba biblioteko.

EKSKURSOJ.

Proksime de la urbo troviĝas la prakverkaro Loode; iom pli malproksime — la alloga alta sablobordo Järve kun densa pinarbaro; je 18 klm de la urbo — la fama Kaali-lago, ĉirkaŭata de alta funelforma bordo; samdistanco de la urbo — la bela Kärla-parko, tra kiu serpen-



Nova ŝlimkuracejo.

TARTU ÜLIKOOLI
RAAMATUKOGU

tumante trafluas argentklara rivereto inter altaj montetbordoj; nemalproksime — la plej bela akvaĵo de Saaremaa — la Karu-lago kun kvin insuletoj; je la distanco de 40 klm de la urbo — la vidinda kalkŝtona rokbordo Mustjala, leviĝanta vertikale ĝis 35 metrojn super la marnivelo; specialan intereson prezentas la birdoinsulo Vilsandi, samkiel la insulo Abruka kun siaspeca vegetaĵaro; krome — ekskursoj al la insulo Ruhnu, al la duoninsuleto Sörve kaj al Riga.



Monumento al batalmortintoj en la Milito por la Sendependeco.

TRAFIKA KONTAKTO.

2-foje tage — omnibuskontakto kun la kontinento: 1) rapidkontakto Tallinn-Kuressaare, 2) ĉiutage omnibuskontakto inter Kuressaare kaj Virtsu. Vaporsipa trafiko (per pasaĝersipo) — 1-foje semajne inter Tallinn-Rohuküla-Kuressaare kaj 1-foje semajne inter Kuressaare-Pärnu-Riga.

VETURU AL KURESSAARE!

La naturo de Saaremaa allogas per siaspeca ĉarmo. Somerumado en Kuressaare donas neforgeseblajn rememoraĵojn por la tuta vivo. Ne troigas la insulano, kantante: „Ei paremat pole kuskil pool, kui suisel ajal Saaremaal!“ (Nenie estas pli bone, ol dum somer' en Saaremaa!)

Pli detalaj sciigoj estas ricevataj de la urbestraro de Kuressaare.



Pinto de duoninsulo Sörve.

Est. A- 17177

